

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W.M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

TRIUMFANTA

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Germ. poŝtĉeka konto 70865,
por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptoj oni skribu sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble. Se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp-kup. aŭ poŝtim. Adresu ĉion al a-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiuj stacidomaj gazet-vendejoj, hoteloj, kafejoj kaj restoracioj.
Komercaĵoj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

JARABONO:

5 dolaroj, 6 guldenoj, 10 ŝvedaj kronoj, 12 ŝvicial frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaŭ norvegaj kronoj, 12 pesetoj, 20 francaj aŭ belgaj frankoj, 30 liroj, 60 finaj markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj, 600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naŭclaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 60 germ. mk., Rusio 12 000 rubl. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas necese pagi lutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole alian sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiginta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3. paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronlare 15 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio, (ĉiu numero banderolita 1,25 mk.).

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadratemetro) 1.50 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĉis 30% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%). ANONCOJ kostas por 1-2 foja enpresado kaj 25 vortoj dekonon de la jarabono aŭ 6 respond-kuponojn; por 3-5 foja enpresado ni kalkulas la duoblon. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj ĉe la abonkonto (5 resp. 10 n-oj). — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉefkunsido, fondiĝifesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.
En korespondaj anoncoj ni forŝirekas ne-necesajn kaj naivaĵojn.

Numero 60.

Edinburgh, Paris, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas, 27. Nov.

Jaro 1921.

Je la Memoro de Antoni Grabowski.

Pri la Vivo de Antoni Grabowski.

Parolado de *Paulo Balkanyi* okaze de Grabowski-memorifesto en Budapeŝt.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor'
Benante la Maisiron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidela al li, ĝis la ĉerko.
La mond' aliĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'!

Jen la vortoj alte flugantaj de nia plej fama poeto esperantista, de Antoni Grabowski, kaj en tiuj ĉi vortoj li mallonge priskribis kaj profetis sian propran vivovoĵon esperantistan. Ĉar inter la anaro li estis tiu, kiu estis adepto de la Majstro „de plej frua hor'“ kaj li estis fidela „ĝis la ĉerko!“ Kaj certe lia memoro kun la memoro de ĉiuj niaj pioniroj eterne vivos en la kultura historio de la homaro.

Antoni Grabowski naskiĝis la 11-an de marto 1857 en Nowe-Dobro apud Chelmno (Kulm) ĉe la Vistulo. Li studis filozofion, lingvojn, natursciencojn kaj kemion en la Universitato Viadrina en Breslao kaj fariĝis inĝeniero-kemistilo, poste direktoro de fabriko kaj fine nur privata scienculo, sperta en multaj lingvoj kaj studenta iliajn sintaksojn, stilistikojn kaj vortarojn. Li verkis multajn seriozajn polajn verkojn, ekzemple lernolibron de kemio kaj polan kemian terminaron, kiun aprobis la Akademio por Sciencoj. Sed li interesiĝis ankaŭ pri la demando de la lingvo internacia, studis la projektojn de tia lingvo, kaj kiam en la jaro de l' apero de Esperanto, en 1887, en librejo de urbo Torun (Thorn) li trovis la unuan broŝuron de Zamenhof pri la nova Lingvo Internacia, li fariĝis ĝia plej fervora batalanto. Kiel vera kavaliro, per agoj kaj kantoj li batalis por sia idealo. Kaj li „surtiris sur la liron de l' esperantistoj orajn kordojn, kiuj ĉarme, mole sonis, jen ploris, jen tondre bruis“ en ĉiuj de li verkitaĵoj. Ho, kiel multajn el ni entuziasmigis liaj vortoj melodij, kaj ni ĉiam pli forte enamiĝis je nia belega lingvo.

En 1888 li renkontiĝis kun Zamenhof, kaj li estis la unua homo, kiu parolis kun nia Majstro per Esperanto. Vojagante Rusujon, li ellernis la rusan lingvon el germana gramatikisto de August Boltz, en kiu estis „La neĝa blovado“ de Puskin. Por provi la taŭgecon de la nova lingvo, li tradukis tiun ĉi verkon, kiu, kiel unua esperantista verko, aperis en Varsovio en la jaro 1893.

Ĝis 1893 li laboris en la teksa fabriko de Ivanov-Vozniesensk en Rusujo, kie li fondis en 1890 esp. grupon. En tiu tempo komenciĝis la fondado de grupoj en kelkaj urboj diverslande, kaj inter ĉiuj tiuj de Grabowski estis unu el la unuaj. En la unuaj jaroj alvenis al la Majstro diversaj proponoj pri ŝanĝoj, kaj okazis la unua enketo de esperantistoj, ĉu oni akceptu la proponitajn „reformojn“. En tiu ĉi jaro Grabowski neis la reformojn. Sed kiam en 1894 oni denove submetis reformprojekton por diskutado, li forlasis Esperanton kaj revenis al la movado nur en la jaro 1903, de kiu tempo li restis fidela fundamentisto. Dumtempe aperis de li tradukoj kaj verkoj ne nur en la unua esp. gazeto, la fama „Esperantisto“, sed ankaŭ en libra formo la dua esp. verko „La gefratoj“ de Goethe en la jaro 1889 en Varsovio, la kvina, kvina kaj sesa esp. verkoj „Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado“ 1890, „La nova jaro“ de Prus kaj „Janko Muzikanto“ de Sienkiewicz, ambaŭ en Nürnberg 1890.

Post 1904 aperis liaj pluaj verkoj en jena vico: „En Svisujo“ de Slovacki, Paris 1904, kaj de la sama poeto „La patro de pestulo



Grabowski en la mezo de Lodz'aj samideanoj.

De maldekstre dekstren: Stanislaw Braun (Viktor Elski), kunaŭtoro de „Unuaj Agordoj“; Stanislaw Karolczyk (Eŝka), alia aŭtoro de „Unuaj Agordoj“; Antoni Grabowski; Alfred Hinz; Wladimir Pfeiffer, vicdel. de UEA.

Mortis Grabowski.

(Deklamita de la aŭtoro okaze de Grabowski-memorifesto de la budapeŝtaj esperantistoj.)

Ho rimoj esperantaj, ektintu nun kun ploro,
Doloron grandan portu tra l' mondo sono via:
Ĉar mortis via majstro, plej granda kaj genia,
Per kiu vi plenigis je vivo kaj sonoro.

Ho Muzo Esperanta, vi en angulo sidis,
En vesto senornama, al „cindrulin“ simile;
L' vestis vin per silko, per perloj ŝuis brile
Kaj prenis vin ĉe mano kaj vin en halon gvidis:

En halon de la arto, en templon de la belo,
Kaj donis li sur liron arĝentonorajn kordojn,
Kaj donis li inspirojn, ke frapu vi akordojn
Plil muĝajn ol la vento, pli dolĉajn ol mielo.

Patron' li estis via, de li vi lernis iri,
De li vi lernis flugi kaj vin ĝis alte ŝvingi,
Kaj lernis vi al ĉiu poeta kor' atingi,
Por lin kore tuŝi, insiigi kaj inspiri.

Ektuŝis vi la korojn, kaj koroj ĝermis florojn:
Printempo de la versoj en nian rondon venis.
Kaj ĉiu verso floro lin benis kaj solenis:
Honorojn al la majstro, ho gloran kaj honorajn!

Ho Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frosto tuŝas,
Vi kun flugiloj lamaj funebre sidas, ploro,
La silkon kaj la perlojn deŝiras vi dolore,
Jeite sur la tero liuto via kuŝas.

Ho Muzo Esperanta, do ne sidadu mute,
Droninte en la larmoj! Se malstreĉigis kordoj,
Ekfrapu ilin tamen! Eksonu la akordoj
Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute!

Doloron kaj funebren sonigu, kante kriju
Pri la kruela bato de l' senkompata sorto!
Ekmuĝos ĉiu sono la kun milobla forto,
Ĉar ehos ĝin en mondo kor' esperanta ĉiul

Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis,
Relevu la flugilojn, denove vi ekiruj!
Ektuŝu novajn koroin, instigu kaj inspiro,
Kiele vin la majstro dum sia viv' instruis!

Ke rimoj esperantaj eksonu kun sonoro,
Laŭ ind' nur ili povas lin glori kaj memori.
Instruis verse ridi li nin kaj verse plori:
Vers' ĉiu nova estas do lia nova glorio.

D-ro Kolomano de Kalocsay.

Senrima kanto estas por mi
Flor' sekigita, sen odor', —
Aŭtun-arbar' — iganta dormi —,
La muzikistoj flugis for.

Kun rimoj dolĉa kant', — sen ili
Parol' senmelodia, ĉar
Kiel ĝi povas fajfl, trili
Kun najtingal' en arbetar'?

De l' rim' potencon konas ĉiu:
Ĝi muĝu, fulmu, tondru tuj . . .!

Ho, liaj rimoj flugas dolĉe kaj karesas niajn orelojn, kvazaŭ ili estus etaj feinoj. —

Alvenis la jubilea kongreso. Kaj Grabowski, kiu estis en Boulogne sur Mer inter la sekretarioj de la I-a kongreso, kiu en 1908 el 26 kandidatoj kun 8 aliaj esperantistoj ricevis la plimulton de la voĉdonoj por fariĝi Akademiano, sidis en Krakovo inter la vicprezidantoj de la VII-a kongreso, kaj en tiu triumfa festnado li povis kunfesti la printempon de nia movado, la printempon de nova mondepoko kun nova homaro.

Dum la krakova kongreso oni ludis la faman polan dramon de Julius Slovacki „Mazepa“ kaj la unuan esperante kantitan operon de pola muzikverkisto, kies tekston skribis W. Wolski,

kaj kies titolo estas „Halka“. Ambaŭ estas tradukaĵoj de Grabowski, ambaŭ aperis en la „Kolekto de Revuo“ en Paris.

Sed la lastaj jaroj donacis al ni lian plej gravan verkon, verkon ununuran en nia literaturo, la tradukon de la fama epopeo de Mickiewicz „Sinjoro Tadeo“ (Pan Tadeusz). La epopeo de Homero estas tradukita en preskaŭ ĉiuj lingvoj, sed la ebleco ĝui verkon de malgranda popolo por ĉiuj nacioj, kaj ĝui ĝin, kvazaŭ la originalon mem, estas tia sukceso de nia lingvo kaj tia pruvo de la talento de Grabowski, ke sola tiu ĉi venko sufiĉas por konservi lian memoron en nia literaturo. Ni travivas la vivon de estinta epoko, ni trasantas la odoron de la originalo, ni forgesas, ke ni legas ion en artefarita lingvo, legante „Sinjoro Tadeo“ de Antoni Grabowski.

Ni rimarku, ke en Esperanto bolas la sango de la nacioj, el kies vortrezoro estas kunmetita nia lingvo, kaj ni admiru la majstrecon, per kiu eksonoras tiuj vortoj sur la liro de Grabowski.

Tadeo vidas en la libro XI-a dum la bataloj de Napoleono la printempon de pola libereco. Ĉu ne samtempe ni trasantas la printempon de la homaro, por kiu ni ankaŭ laboras kaj kies matenuro estas la nunaj sukcesoj de nia lingvo? Mi rememoras la entuziasmajn, sukcesajn tagojn de niaj lastaj kongresoj, kiam mi legas en „Sinjoro Tadeo“:

Printempo, kiu vidis vin sur la kamparo!
Memorinda printempo de l' milita jaro!
Printempo, kiu vidis vin tiel florantan
Per la grenoj kaj herboj, per homoj brilantan,
Event-plenan, gravedan de l' esper' ĉiel!
Mi vin ankoraŭ vidas, song' vidoj bela! . . .
Mi, naskita sub jugo, vindita en fero,
Havis nur unu tian printempon sur tero. —

Kaj al Grabowski estis donacita la felico, ne nur vidi tiun printempon, sed ankaŭ prepari ĝin.

La serioza laboro, kiun li faris en la Esperantista Akademio kiel direktoro de la komisiono por la gramatiko, same multe antaŭenhelpis nian movadon. En liaj poemoj, precipe en „Sinjoro Tadeo“, ni trovas interesajn novajn frazakraĵojn kaj vortkunmetojn, kiuj montras, ke la lingvo per la talentaj verkistoj, per la poetoj evoluos per si mem abunde, kaj tamen sur la fundamento de Zamenhof.

Ni ne forgesu lian pravan respondon al demando de esperanta gazeto pri la evoluo de Esperanto kompare al la naciaj lingvoj: „Ni gardu la naturan evoluon de nia vivanta lingvo internacia. Antaŭ propono de iu ŝanĝo ni demandu nin, ĉu ion analogian ni kuraĝus fari en nia lingvo nacia.“ Ĉi tiun frazon multaj esperantistoj forgesas, kiuj kritikis diversajn ŝajnajn aŭ verajn mankojn de Esperanto, ne riskante fari eble plej malgrandan proponon publike pri ia absurdajo de nacia lingvo, kvankam Esperanto montrigas almenaŭ same taŭga kiel la naciaj lingvoj por ĉiu temo kaj por ĉiu homa interrilato, kvankam Esperanto neniam volas esti la lingvo plej perfekta kaj plej logika; kaj se oni provus fari ĝin tia, ĝi perdis sian facilecon povante neniam atingi, kiel neniam homa afero, plenan perfektecon! Lingvo ja ne estas matematiko, sed respegulo de la senbride vagantaj homoj pensoj, kiuj havas diversajn nuancojn, ofte tre kontraŭajn, ofte ne kompreneblajn kaj kiujn precize redoni logika lingvo eĉ ne povus, ĉar en tia manko — almenaŭ por nia hodiaŭa scienco — la plena logiko. Esperanto estas simpla, facila kaj taŭga por esti internacia lingvo, do ni uzu ĝin tia, kia ĝi estas!

(Daŭrigo sur la dua paĝo.)

Fremdula Legio. Atentu!

Ni serĉas la filon de ano de nia loka grupo, kiu malaperis dum la milito en la jaro 1918 en Nord-Franco. Li estis korporalo en germana regimento, kaj lia nomo estis Hans Paetzold. Li estis el Perleberg kaj naskiĝis la 26. dec. 1895. Verŝajne li estas vundita kaj kaptita de francoj. La gepatroj vane atendis sciigon. Li ne skribis ĝis nun. Ni supozas, ke li servas en la fremdula legio kaj ne volas iri aŭ skribi hejmen.

Ni petas samideanojn sciantajn ion pri li, doni al ni sciigon laŭ la adreso: Esperanta Grupo Perleberg, s-o Goreck, Wittenberger Str. 13, Perleberg, Germanujo.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Ellerstein --- Wissmann-str. 48 (Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiujmonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkuponon aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Jus aperis:

Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano

de J. Sapiro (Joŝo)

Rekomendita de Esp. Lit. Asocio.

Plej bona kaj amuziga legaĵo por esp. grupoj. 42 paĝoj, kun ilustraĵoj. Prezo 5 respondkuponoj stampitaj.

Demandu specialajn prezojn en naciaj valutoj. — Libroj kaj esp. vendejoj ricevas rabaton je pli granda mendo. Mendo ĉe Pola Esp. Servo, (Fr. Prengel), Bydgoszcz, Kordeckiego 1a (Polujo).

Importo. Eksporto.

Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Reprezentado. Perado.

Tutlanda Estona Junulara Unuiĝo

(Ülemaaline Eesti Noorsoo Ühendus)

petas sendi informon pri

Junulara vivo en ĉiuj landoj de la mondo,

mallongajn priskribojn pri liaj organizacioj kaj unuigoj ekster kaj en la landoj. Volonte ankaŭ interŝanĝas

Journalojn aŭ gazetojn de junularo

(nacilingv. aŭ esp.) manuskribitajn, hektografitajn aŭ presitajn.

Sendaj adresu al A. Jöger, Villardi tän 13-9, Tallinn, Estonio. : La poŝtelspezojn oni kompensos.

Kiu helpos?

Apartenante al la nuntempe tiom kompatindaj malgrandaj rentuloj, mi serĉas daŭran restadon kaj okupadon pri librotendado, korespondado aŭ ian konfidoficon en komerca aŭ privata domo. Mi ja estas iom malluna, sed sana, tre vigla kaj laborema; aparta honorario ne estas postulata. Ankaŭ kiel zorgema guvernisto mi kapablas funkcii.

Bonvolu vin turni al la redakcio de ET sub A. 1.

Eksporto - Firmoj

kiuj interesiĝas pri la eksporto de

Blankaj Brasikoj

porvagono, bonvolu tuj sciigi la firmojn Basilio Travaglia, Trento (Ital.) pri eksportebleco, prezo, pago kaj liverokondiĉoj.

Korespondado en itala, germana, franca lingvoj kaj en Esperanto.

Abonejoj de ET

en la landoj

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Bulgara: Georgi Fr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia. Ĉeĥoslovaka: Otto Stenčka, Hradec Králové. Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn. Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki. Franca: Esp. Centra Librero, 51 rue de Clichy, Paris 9. (Abonprezo: 0,45 fr. X nombro da dezirataj sinsekvaj numeroj.)

Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12.2. Hungara: Paŭlo Balkanyi, Haios-utca 15 II-2, Budapest VI. Litova: Paŭlo v. Medem, Smelju g-ve 12, Kaunas (Kovno). Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto Centro, Targul-Mureŝ. Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U.S.A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Art-Amikoj,

Artaĵo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstrijaj, turnu sin al

Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.

Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Korespondantoj! Atentu!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron, posedi fotografiojn de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por tiu ĉi interŝanĝo tre malmultekostajn belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 30 mk., kun kompleta adreso 35 mk. Formato 95 : 45 mm Farotaj laŭ ĉiu ajn fotografajo, kiu estos resendata sendifekte. Livertempo 2—3 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ., Antonstr. 31.

Al hon. rev. samideano

Cronkhite en Bassein, Burma

amerika misiisto

pro la 40-a datreveno de lia unua enŝiĝo en New-York por iri al nekonservata Burma

sendas koran gratulon

liaj sinceraj amikoj kaj la redakcio de ET.

Sovjeta Rusujo!

1921: 100, 200, 250, 300, 500, 1000 rubloj.

1918: 35, 70 kop.

Ĉiuj kune nur 55 gmk. Ankaŭ ĉiuj aliaj poŝtmarkoj.

Gefr. Fischer, Nürnberg, Germanlando, Fünferplatz 6 III. Fünferplatz 6 III.

Franz Döring, Freiburg i. Br.

(Germanujo) Zasiusstr. 6

Pogrand-Komerco de Ligno

Tel. 2017. Telegr.-adr.: Holzdöring Freiburgbr.

ofertas:

Normaltipajn

Fervoj-relajn Trabojn el kverko aŭ fago (angle „Sleepers“)

en ĉiuj dezirataj

mezuroj, precipe por Anglujo, Belgujo, Francujo.

L' Esperanto

Monata ilustrita internacia revuo sub patronado de Itala Katedralo de Esperanto.

Abono: 15 lirojn (8 francajn fr.)

(per poŝtmandato, ĉeko, respondkuponon, aŭ en kiu ajn nacia mono, en rekomendita letero).

Direkcio:

A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo).

Konstantaj rubrikaj de la Revuo dum 1921 (ĉiuj en E.):

Ĉefa artikolo. Gramatiko de Friula Lingvo. Esperanta Sinonimaro. Kiel oni fariĝas grafologo? Rimoi kaj Versoj. Noveloj kaj Rakontoj. „Itala Animo“, diligenta tradukado de verko de klasika itala aŭtoro. Revuo de la Revuoj, interesplena rubriko, kiu per klaraj resumoj kolektas la plej notindajn sciindaĵojn aperintajn en la ĉefaj E. gazetoj de la mondo pri la plej diversaj temoj „De Alpoj al la maro“, priskriboj de la urboj kaj de l' mirindaĵoj de Italio. Esperantaj sciigoj. Recenzoj, korespondado, humorajaj ktp.

Preskompostisto serĉata.

Kondiĉoj: korekto kaj bona sciopovo de Esperanto. — Tujajn ofertojn petas la preĵejo de „Esperanto Triumfonta“ en Horrem apud Köln, Germanio.

Eksportado

Importado

JAPANA

ESPERANTA KOMERCA KORPORACIO

JOKOHAMA, JAMAŜITAĜO 80

日本エスペラント貿易商會

輸出輸入商

横浜市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Reprezentanto: R. Kreuz, Frankfurt a. M. (Germ.), Hedderichstr. 75.

Anoncetoj.

ESPERANTIO, nova ilustrita gazeto por socia vivo, literaturo, arto, humoro, filatelo ktp. serĉas kunlaborantojn el ĉiuj landoj. Sendu ĉion al P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germanio.

DIAPOSITIVOJ POR LUMBILDOJ de la XIII-a Kongreso, en sep diversaj specoj jam montritaj, por 180 kĉ inkl. poŝtelspezoj: poste serio de la fotoj el la XIII-a: Malferma kunsido 12 kĉ, fremduloj 12 kĉ, 2 Karlus Tyn po 7 kĉ, granda grupo 12 kĉ kaj kelkaj en poŝtkarta formato po 5 kĉ. Riceveblaj ĉe J. B. Vlach, Praha II, poŝt-fako 504.

AMUZIGAJ NOVAĴOJ Kiu povus min informi pri bonprosperantaj amuzigal novaĵoj aŭ pri la projektoj aŭ eltrovoj, kiuj taŭgas por amuza entrepreno. Proponoj kun kondiĉoj bonvolu adresi al: Jan B. Vlach, Praha II, poŝt-fako 504.

ELDONANTOJ KAJ LIBROVENDANTOJ, baldaŭ aperos „La plena lenolibro por rusoj — kun gramatiko kaj du (esp.-rusa kaj rusa-esp.) vortaroj“. Publikigu viajn eldonojn kaj firmojn en tiu grava kaj multe disvastigata libro. Volu la specialan tarifon peti de P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg, Goethestr. 15, Germanio.

LA REVUIO, Hachette. S-o van Tinteren, Amsterdam, 84 Saxen-Weimarlaan, deziras aĉeti malnovajn jarkolektojn kaj petas proponojn.

ALFABETUMOJN naciajn, eĉ uzitajn, deziras ricevi H. Janverk, Vazalemo, Estonio. Same la stenografistemon de Jirotofski (rusa) kaj „Paragon“ (angla-amerika).

GEINSTRUISTOJ diversaciaj! Bonvolu alsendi ABC-lernolibron por elementa lernejo laŭ plej nova sistemo verkita, eble uzitan. Kun simila komplezemo Kalman Papp, instr., Püspökkladány, Hung.

ANONCOJN por estonaĵo gazeto kaj ĵurnalo, disvastigadon de presajo kaj oferto en „Rusio prizorgas Esperanto-oficejo Tallinn-Vazalemo, Estonio. Almetu resp.-kup.

ESP. EKSPOZICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas per konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantaĵojn, propagandilojn ktp.

„ESPERANTO“ de UEA, n-on 182 de okt. 1915, deziras aĉeti s-o Ploussu, del. de UEA, 4 Place I. Achard, Grenoble, Francujo; por ĝi li pagos la montrotan prezon.

LIBRO-AMANTOJ ATENTU! Kiu estas amanto por antikva Luther-biblio, presita en 1583 de Hans Lufft? Prezproponoj al Marg. Schoske, Breslau, Germ., Schwelnd. Stadtgraben 1 (65).

Korespondeo kaj Interŝanĝo.

Liverpool (Anglujo), Jas. Jones, 9 Hurry St., deziras korespondadi kun kooperativanoj pri internaciaj kooperativaj aferoj.

F-ino Ctalina Montaner, Danús 1-1, Palma de Mallorca, Hispanio, interŝanĝas ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, korespondas esperante, france, angle kaj hispane.

S-o Ad. Houben, Kattenberg 28, Borgerhout, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando.

Pal Dinda, II, Telekhaz g. 5, Temesvar, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

S-o instruisto J. Wunsch, Karlsbad, Ĉeĥosl., Brückenstr., serĉas gekorespondantojn ĉiulandajn por siaj gekursanoj pleneĝaj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

S-o Frant. Balíček, instruisto, Červeny Kostelec, Ĉeĥosl., interŝanĝas poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn, monojn kaj lernantulaĵojn desegnaĵojn precipe kun ekstereŭropaj instruistoj.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abononto. Oni invitas artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se neceso respondos.

Redaktoro,

4 Princeton St., London W. C. 1.

Erwin Thun, Grottau, 417, Zittauerstr., Bohemio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Kiu deziras korespondi kun samideanoj el Chojnice, skribu al s-o K. Majorkiewicz, instr., Chojnice, Pol., Pl. Krol. Jadwigi 2.

S-o Br. Kruszczyński, Bydgoszcz, Polonio, ul. Siemiradskiego 20, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Mi sendas por 20 gmk. aŭ 40 jalsamaj nedifektitaj poŝtmarkoj 36 poŝtmarkoj de Meza Litovio. — H. Horodniči, Wilno, Sw. Anny 7-7.

F-ino Maria Ambrojunas, Tallinn, Postkast 6, Estonio, deziras korespondi pri teozofismo, okultismo, telepatio, grafologio, hironantio, mitologio, religio, medicino kaj pri amo.

Paul Berg, Öle t. 6, Tallinn, Estonio, deziras korespondadi pri mitologio, popolpoezio, historio de literaturo kaj pri historio.

S-o Aŭgusto Birk, Tallinn, Estonio, W. Balesna 5-1, deziras korespondi pri teozofio, okultismo, grafologio, telepatio, hironantio, religio, filozofio kaj pri amo.

S-o Paul Männ, poŝtoficiisto, Estonio, Ambla, Postitän 3, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn (stampitajn), kontraŭ poŝtkartoj ilustritaj per albumo. Li deziras ankaŭ korespondadon kun samideanoj el ĉiuj landoj.

S-o V. Pimenov, Staropavlovskoe, Tersk, obl., Rusl., deziras per siaj 15 kursanoj-gejunuloj (kozakidoj) havi korespondantojn en ĉiuj landoj, por interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., leterojn, poŝtmarkojn ktp.

Vjaĉeslav Vasiljeviĉ Kalaŝnikov, Rus., urbo Niŝnij-Novgorod, Gruzinskij per. 6, kv. 6, deziras korespondadi kun la tuta mondo pri esp. movado, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kun vidoj de urboj kaj kolektas ĉion en kaj pri Esp.

S-o Manuel Noelle Güell, General Arenales P. O. P., Argent., Sudameriko, deziras interkorespondadi kun samideanoj ĉiulandaj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr., pri iaj temoj, precipe pri socialista movado; ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn, revuojn, librojn esperantajn ktp.

D-ro Plagge en Kötichenbroda (Germ.) deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kun eksterlandanoj pri karakterizaj naciaj vidindaĵoj, kutimoj, moroj, vojaĝoj; li ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Friedrich Hahn, Bremen, Germ., Riensbergerstr. 22, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj; ankaŭ interŝanĝi librojn nacilingvajn kun ĉiuj landoj.

S-o F. X. Hofmann, librotendisto, München, Germ., Karl Singer Str. 10, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun eksterlandanoj.

Por la infan-instruado en Mainz mi serĉas gekorespondantojn. P. Becker, Mainz, Germ., Holzstr. 10.

S-o Eduard Volkmann, Düsseldorf, Germ., Uerdingerstr. 77, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Willy Puls, Gelsenkirchen, Grenzstr. 116, Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Freiberg Sa., Germanujo, 4 sinjoroj deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Skribu al: Gerhard Brüder, Herderstr. 4-1.

F-ino Willy Thiele, komerca direktoro, Zittau, Saksujo, Böhmische Str. 3, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun samideanoj eksterlandaj.

S-o Rob. Pandikow, Rülstringen, Müllerstr. 55, Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiu lando.

S-o Walter Urban, ingeniero, Glashütte-Sa., Germ., deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Pobritz, Germanlando, serĉas tiumondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn.